

# Esperanto-Informilo

62-a jaro

por Berlino kaj Brandenburgio

(652) 06/2011

## Ĝojo kaj tristo

Ĉi-tempe donas al ni la vivo okazojn por ĝoji kaj tristi, gratuli kaj funebri. Ĉe la gajiga flanko s-ino Hildegard Stolpe atingos la 25-an de junio la respektindan aĝon de 90 jaroj kaj la eminenta berlina Esperantisto kaj lingvosciencisto d-ro Detlev Blanke sepdekjariĝis la 30-an de majo. Ni kore gratulas al ili kaj dankas pro iliaj meritoj kaj agadoj por Esperanto. Bedaŭrinde forlasis nin du meritplenaj homoj, s-ino Eva Bork kaj d-ro Karl-Hermann Simon, kiuj, ĉiu en sia kampo, laboris por la afero de Esperanto. Al ili iras nia danko kaj al iliaj familianoj kaj proksimuloj niaj sinceraj kondolencoj.

## Hildegard Stolpe 90-jara

La 25-an de junio Hildegard Stolpe, kiu dum multaj jaroj estis membro de Esperanto-Ligo Berlin, plenumos sian 90-an vivojaron. Longan tempon ŝi gvidis la konatan Esperanto-grupon «Kompreno», kiu ĝis sia fino regule kunvenis en la kafejo Kammann en la kvartalo Charlottenburg. Hildegard

Stolpe estis plurfoje honorita pro pluraj jardekoj da engaĝiĝo en la profesia kaj honorofica agado, interalie per la Federacia Meritkruco.

Esperanto-Ligo Berlin kaj la berlina esperantistaro elkore gratulas al ŝi okaze de ŝia unika jubileo.

## D-ro Detlev Blanke jubileas

La 30-an de majo d-ro Detlev Blanke festis jubileon. En tiu tago li povis rerigardi al 70 vivojaroj. Jam kvardek tri jarojn li loĝas, laboras, agadas en Berlino.

Lerninte Esperanton en aĝo de 16 jaroj li komencis deciĉi sin al por-esperanta agado jam kiel studento kaj komence de sia profesia kariero, kiam li laboris kiel instruisto en Meklenburgio.

Grave kontribuis Detlev Blanke al la evoluo, kiu ebligis, ke organizita laboro por Esperanto, post malfacilaj jaroj, estis oficiale permesita kaj pli poste rekonita, en formo unue de laborrondoj kaj poste de asocio en la kadro de Kulturbund (Kulturligo), kiu celis roli kiel tegmenta organizaĵo por intelektuloj kaj kulturinteresatoj de Germana Demokratia Respubliko (GDR).

Detlev Blanke estis sekretario de la Centra Laborrondo Esperanto / Esperanto-Asocio de GDR en la jaroj 1968 ĝis 1990 kaj respondeca redaktoro de «der esperantist» de 1970 ĝis 1990.

Serioza science bazita informagado, sistemeca kaj motiviga organiza laboro, kontinua klopodo pri plialtigo de la scinivelo de la membroj - jen kelkaj ĉefaj tendencoj de lia agado en tiuj oficoj.

Kiel vicprezidanto de GDREA Detlev Blanke multe kontribuis al tio, ke la unuiĝo kun GEA okazis en la jaro 1991 dece kaj senkonflikte en atmosfero de reciproka respekto.

Iniciatinte en tiu sama jaro la fondon de GIL (Gesellschaft für Interlinguistik / Asocio por Interlingvistiko) li agas jam dum du jardekoj kiel ties prezidanto kaj motoro. Li konstante kaj multflanke kontribuis al la evoluo de tiu asocio, kiu kapablis akiri rekonon kiel scienca forumo kaj provizis la interlingvistikon per renoma adreso en la germanlingva scienca komunumo.

Tiel kontinuas longa celkonscia kaj sukcesa scienca agado, kiun d-ro Detlev Blanke plenumis aŭ iniciatis.

Jam en 1964 li organizis en Rostock la unuan interlingvistikan seminarion en universitato de GDR. La fondon de la faka grupo Interlingvistiko/ Esperantologio d-ro Blanke iniciatis 1970. Ekde 1974 li komencis kunlabori en la

Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED). Detlev Blanke doktoriĝis per disertacio pri komparo de la vortfarado en Esperanto kaj en la germana (en 1976) kaj akiris la renomon de nacie kaj internacie konata lingvisto.

En ĉiu el la jaroj 1979 ĝis 1989 d-ro Blanke organizis internacian interlingvistikan seminarion por profesiaj sciencistoj en Ahrenshoop.

Post habilitiĝo per disertacio pri planlingvoj (en 1985) en Humboldt-Universitato Berlin li tie kiel docento dum multaj jaroj gvidis lekcio-seriojn, kiuj estis tre popularaj inter la studentoj.

Eĉ nur skizi la paletron de liaj ĵurnalistaj kaj sciencaj publikigaĵoj, tio ĉi tie ne eblas pro ilia ampleksa abundo.

Laste, sed grave, ni memoras kun danko, ke apud sia vasta kaj senlaca scienca laboro d-ro Blanke regule partoprenas kunvenojn de la regiona kaj loka Esperanto-organizaĵoj EABB kaj ELB kaj ĉiam pretas subteni ilin en multaj rilatoj.

Okaze de via jubileo, kara amiko Detlev Blanke, ni elkore gratulas kaj deziras al vi sanon kaj energion, sukcesojn kaj ĝojojn por la estonteco.

La estraro  
de Esperanto-Asocio  
Berlino-Brandenburgio



## Nova retejo por Esperanto en Berlino kaj Brandenburgio!

La 20-an de aprilo, ni lanĉis novan retejon por la regiono de Berlino kaj Brandenburgio kiu troviĝas ĉe [www.esperanto.de/bb](http://www.esperanto.de/bb). Tiel vi povas pli rapide kaj facile trovi informojn pri aktualaĵoj, lokaj grupoj, kursoj, informiloj, asociaj dokumentoj ktp. Ni planas ankaŭ baldaŭ havi fotojn de ĉiuj grupoj kaj ni ankaŭ povus doni rajtojn por redakti la paĝaron al aktivuloj, por ke ni povu pli facile teni ĉiujn informitaj.

La prezidanto de EABB, Felix Zesch, multege helpis al mi rilate al enhavaj kaj teknikaj aferoj. Nova kursano, Tanja Borzel, kreis belan bildon por la kaplinio. Ni cetere volas multe danki al Beate Mielke pro ŝia prilaboro de la malnova retejo de 1997-2011. Tio estis grava enhava fundamento kiun ni uzis por konstrui nian novan retejon.

Tio tamen ne estas la fino. Ni havas multajn planojn por evoluigi la retejon: integri informojn de [www.brandenburgio.de](http://www.brandenburgio.de), informojn pri Eo-lokoj en Berlin kaj veran kalendaron en la retejo. Ni ankaŭ invitas grupestrojn kunlabori pri aktualaĵoj de sia grupo. En la festo de la 10-jariĝo de la Esperanto-domo en Lichtenberg je la 13-a de aŭgusto, mi klarigos kiel funkcias la sistemo, por ke ankaŭ vi povu informi ĉiujn pri via agado per nia reta inform-kanalo.

Ni kompreneble scias, ke ĉi tiu retejo estas unua paŝo, do ne estas perfekta. Tial ni petas ĉiujn komentojn, laŭdojn kaj kritikojn de vi ĉiuj, por ke ni povu plibonigi la informfluon. Mi ĉiukaze esperas je fruktodona kunlaboro kaj esperas, ke la retejo multe plaĉas al vi!

Chuck Smith



## Esperanto-domo en Michendorf vendita



Komence de tiu ĉi jaro, la asocio Esperanto-Haus Michendorf r.a. (registrita asocio) decidis vendi la Esperanto-domon en Michendorf, al la asocio Esperantoland r.a. Ties prezidanto estas Lu Wunsch-Rolshoven. La deziro vendi la domon estis anoncita jam en la jarĉefkunveno de EABB en 2010.

La domo situas iom sude de Potsdam, kaj tie en la pasinteco ofte okazis la someraj festoj de la berlinaj kaj brandenburgaj Esperanto-asocioj. Nuntempe ĝi estas en iom mizera stato.

*FZ: En kia stato estas nun la domo?*

Lu: Aktuale la stato estas la sama kiel antaŭe. Post la vendo ankoraŭ ne komenciĝis la renovigo, nur ties planado.

*FZ: Ĉu vi havas imagon kiam vi povus fini la renovigon de la domo?*

Lu: Mi esperas, ke la plej esenca parto de la renovigo povos okazi ĉi-jare.

*FZ: Kion vi intencas fari en la domo en la estonteco?*

Lu: La domo estu uzata simile kiel antaŭe, do la loĝejo estu ludonata. Krome eblos uzi aliajn partojn de la domo lige al Esperanto, ekzemple por stoki materialojn.

*FZ: Ĉu eblos ankaŭ en la estonteco tie okazigi la somerajn festojn de Berlinaj kaj brandenburgiaj Esperantistoj?*

Lu: Jes, certe, estos tre bele daŭrigi tiun tradicion.

Felix Zesch

## Pli ol 1000 konsultoj de la blogo dum aprilo

Dum la lastaj monatoj la utiligado de la blogo «esperanto-berlin.blog.de» konstante kreskis. Dum aprilo 2011 la nombro de unuopaj konsultoj (Page-Hits) superis la unuan fojon la markon de 1000. Kutime inter 10 kaj 20 diversaj personoj dum la tago vizitas la blogon. Dum pintaj tagoj okazis pli ol 100 konsultoj de paĝoj.

La blogo estas la elektronika komplemento al la papera informilo. Foje aranĝoj, kiel ekzemple la instalo de nova tabulo en «Zamenhof-Park» vespere la 14-an de aprilo, estas planataj post la dissendo de la «Informilo».



Per la blogo oni povas rapide ekscii, kio okazas en Berlin kaj Brandenburgio. Se eblas, kaj tio dependas de partoprenantoj, kiuj sendas raportojn aŭ fotojn, la blogo ankaŭ prezentas la impresojn kaj rezultojn de kunveno.

La redakta koncepto de la blogo estas, menciigi nur tiajn aferojn el la bunta vivo en Esperantujo, kiuj iamaniere rilatas al Brandenburgio kaj Berlino. Kutime por du eventoj ĉiusemajne troveblas interesa materialo kiel fotoj, bildoj kaj grafikaĵoj.

Foje, sed ankoraŭ tro malofte, eblas uzi la materialon por gazetara informo al la germanlingva gazetaro. Kursoj, kulturaj prezentoj aŭ specialaj aktivecoj, kiel dum aprilo la purigado de Zamenhof-Park povas esti bazo de gazetara informo (Pressemitteilung), dum la internaj prelegoj, precipe se ili okazas en Esperanto, ne estas taŭgaj. La tekstoj aperas en la blogo kun la marko «PM».

Sendi aldonajn informojn eblas rekte per la blogo, kie troviĝas bedaŭrinde malmulte uzata funkcio de komento sub ĉiu artikolo. Kompreneble oni povas ankaŭ sendi retmesaĝon al [esperanto@berlin.de](mailto:esperanto@berlin.de).

Roland Schnell

komisiito por gazetara laboro.



## Printempa Purigado en Berlin-Lichtenberg


Sabaton, la 9-an de aprilo renkontiĝis en la Esperanto-Domo en Berlin-Lichtenberg ses Esperantistoj por partopreni en la distrikta Printempa Purigado (Frühjahrsputz). Ili laboris precipe en Zamenhofparko, preparante ankaŭ anstataŭigon de la malaperinta parko-nomŝildo kun klarigo pri la iniciatoro de la lingvo Esperanto.

### Esperanto-domo jubileas

Antaŭ dek jaroj konkretiĝis la planoj por Esperanto-domo en Berlin kaj en aŭgusto 2001 la domo en Einbecker 36 estis aĉetita de Peter Kühnel kaj Johann Pachter. Memore al tiu evento unika en la historio de la Berlina Esperantovivo, ni volas renkontiĝi la 13an de aŭgusto 2011 posttagmeze je la 14a horo por reen- kaj antaŭenrigardi al la domo. Programero ankaŭ estos la enkonduko en la redaktado de la nova retpaĝaro. Detala programo en la sekva eldono.

### Invito al somera festo

Post la bonaj spertoj en la pasinta jaro Esperanto-Asocio Berlin-Brandenburgio denove invitas somera al festo sur la grundo de familio Langer en Jüterbog, Ziegelstraße 35. Sabate, la 27-an de aŭgusto 2011 ekde la 14-a horo (je la 13-a publika estrarkunsido), atentos vin hejmeca tegmentita teraso en trankvila ĝardeno kun tenistablo kaj kradorostilo en interesa mil jarojn aĝa urbeto, kiu situas sude de Berlino. Aldonajn informoj komunikos la sekva eldono de EIBB.



Kolore ornamita plafono de la preĝejo Sankta Nikolao en Jüterbog (fotis Clemens Franz)

## Ponta Festo en Frankfurto ĉe Odro 2011

Denove EABB partoprenis je la 1-a de majo en la «Ponta Festo» de la urbo Frankfurto ĉe Odro per informstando sur la Odro-promenejo inter la 10-a horo kaj la 18-a.

Kvankam la stando en la pasinta jaro ne okazis, nian asocion la organizantoj bonvenigis tutkore. Ni kiel kutime informis pri Esperanto kaj la diversaj eblecoj por aplikado kaj lernado de la Internacia Lingvo. Por lernemuloj eĉ haveblis lernolibroj.

Ĉar Tutpollanda Esperanto-Kongreso okazis je la sama tempo en Nowy Sącz mi supozis, ke mi kaj miaj gastoj el Tuluzo devos resti solaj. Kiel mi ĝojis, ke tamen polaj esperantistoj jam sabate anoncis sian partoprenon kaj ke dum la koncerna tago unue Christiane Altrogge el Berlino tute hazarde surprizis min kaj multe helpis ĉe la stando. Multan dankon al ŝi pro la grava subteno dum pluraj horoj.

Post ŝia foriro venis internacia rondo el Berlino (Johann Pachter), Ukrainio (Irina Gerasimova) kaj Pollando (Arturo). Do, entute ni povis ĝui kaj demonstri internacian etoson kaj espereble sukcese varbi por Esperanto. Unuafoje ni ankaŭ disdonis ruĝajn diantojn okaze de la tago. De la enspezo de tiuj profitu infanoj el Ĉernobilo.

Ĉifoje mi sukcesis publikigi anoncetojn en diversaj lokaj gazetoj pri la informstando kaj tio iamaniere de tempo al tempo rimarkeblis laŭ la preterirantaj frankfurtanoj kaj gastoj de la urbo.

Kortuŝa momento estis, kiam ni skribis gratulkarton por esperantistino, kiu nun loĝas en Frankfurt ĉe Odro kaj festis la 100-an datrevenon de sia naskiĝtago je la 2-a de majo. Ne nur multaj esperantistoj konas ŝin. S-ino Hypius aktivadas kaj per Esperanto kaj per muziko.

Je la 18-a horo ni komune enpakis ĉiujn aferojn, kiujn mi tuj portis hejmen. Post horo ĉiuj restantaj esperantistoj renkontiĝis en la jam tradicia azia restoracio de Słubice.

Jam sabate la polaj partoprenantoj el Poznań kaj ties ĉirkaŭaĵo prezentis diversajn planojn pri la sekvaj festoj. Ilin oni povus plilongigi per aliaj kulminoj kaj tranoktado en ĉambroj kaj luksaj kaj favorprezaj, eĉ laŭ diversaj kategorioj.

Je la dua tago oni ekzemple povus komune ekskursi aŭ al polaj aŭ germanaj ripozlokoj kaj vidindaĵoj. Memkompreneble tio dependas de la ĉirkaŭantaj tagoj kaj la entreprenemo de eblaj partoprenontoj.

Ronald Schindler

## **Der Kulturverein Prenzlauer Berg e. V. lädt ein ...**

***am 26 Juni 2011 um 14.00 Uhr im Kulturzentrum Danziger 50  
zu einer historisch-biografischen Veranstaltung***

**Adolf Sproeck (1890-1978)  
Handwerksmeister, Bezirksparlamentarier, und Esperanto-Poet  
aus dem Prenzlauer Berg**

Einlass und Ausstellungseröffnung ist bereits um 13.30 Uhr.

### ***„Stimmenthaltungen schätze ich nicht.“***

Dieses geflügelte Wort von Sproeck war wohl auch sein Lebensmotto.

#### **14.00 Uhr „Sozialdemokrat und Arbeiter-Esperantist“**

Der erste Veranstaltungsteil enthält Beiträge zu Sproeck als Gründer und Organisator von Arbeiter-Esperanto-Organisationen, als Redakteur und Publizist zwischen 1911 und 1933

#### **15.45 Uhr „Bezirksparlamentarier und Esperanto-Poet“**

Im zweiten Veranstaltungsteil geht es um Sproecks Wirken als SPD-Bezirksverordneter nach 1945 und sein belletristisches Werk.

Vorgesehen sind außerdem: Eröffnung durch den Vorsitzenden des Kulturvereins, Grußworte, ein Einführungsvortrag und musikalisch-literarische Beiträge, eine Pause mit Kaffee, Tee und Gebäck. Ende gegen 17.00 Uhr

**Anmeldungen bitte bis 24. Juni 2011.**

ZENTRUM Danziger 50, 10435 Berlin, Danziger Str. 50 ([presse@danziger50.de](mailto:presse@danziger50.de)).



## Adolf Sproeck

### - Limerikoj –

Ĉar beb' en kliniko ekkrias,  
La patro ĉagrene ebrias.  
Ne estas banalo,  
Sed vera fatalo,  
Ĉar lia edzino ne scias ...

#### Faŭsto I

Doktoro knabinon persvadas,  
Li ŝian virgecon invadas.  
Pro ina malforto  
Plenumas sin sorto ...  
Kaj Faŭsto rapide sin savas.

#### Faŭsto II

Pro oldaj kaj lamaj jam kruroj  
Ne eblas plu am-aventuroj.  
Li al politiko  
Kaj marborda digo  
Sin turnas kaj agrikulturo.

## Adolf Sproeck

### - Rimsaltetoj (Ŝnadahupferl) -

La viroj hamburgaj ja estas konataj  
Pro viglo kaj temperament montrataj.  
En ili ardegas la vervo hispana,  
Jes, sed de hispano ĝismorte malsana.

Pro blua okul' de maristo-edzino  
Demandas Maria al la amikino.  
«De l' edzo? Mi pensas, li krozas sur maro. »  
«Mi ankaŭ ĝin pensis, sed estis eraro! »

Picasso kreadis pentraĵojn tre multajn,  
Kaj kelkaj senĝene kritikis: «tro stultajn. »  
Li diras (ludante je la umbiliko):  
«Mi pentras por mi, ne por fia publiko. »

Sinjoro demandas la ĉarman fraŭlinon:  
«Ĉu iri hodiaŭ vespere en kinon? »  
Responde ŝi diras: «mi timas nenion.  
Ĉu spekti la filmon, aŭ preni loĝion? »

## Kontaktoj:

### Germana Esperanto-Asocio

Einbecker Straße 36, 10317 Berlin, infozentrum[ĉe]esperanto.de  
konto: 860 3600 ĉe Sozialbank Mainz (banka kodo: 550 205 00)  
**Ekde 2011 ĉiuj brandenburgiaj kaj berlinaj esperantistoj direkte  
demandojn rilate al sia membreco rekte al la supra adreso!**

### Esperanto-Asocio Berlin-Brandenburgio kaj Esperanto-Liga Berlin e. V:

Einbecker Straße 36, 10317 Berlin,  
eabb[ĉe]esperanto.de  
konto: 70550102 ĉe Postbank Berlin (banka kodo: 10010010)  
Prezidanto: Felix Zesch, tel.: 030 81809112  
Vicprezidanto: Ronald Schindler, tel.: 0335 535654

### Berlina Esperanto-Junularo:

Einbecker Straße 36, 10317 Berlin  
ej.berlin[ĉe]esperanto.de  
tel.: 030 428 578 99

### EsperantoLand e.V. :

Lu Wunsch-Rolshoven, tel.: 030 685 5831, esperantoland[ĉe]esperantoland.de,  
www.EsperantoLand.de

### Esperanto? Plenu! - praktikada tablorondo:

Philippe Beaudonnet, tel.: 030 217 562 33, philippe.beaudonnet[ĉe]gmx.net

### Ĵaŭda Rondo:

renkontiĝejo: Einbecker Straße 36, 10317 Berlin, tel. 030 428 578 99

### Grupo Lietzensee:

Hans Moser, tel.: 030 8621411

### Presindikoj

**Redaktis** Philippe Beaudonnet kaj Henryk Wenzel (eibb[ĉe]esperanto.de)  
**Eldonas:** Esperanto-Asocio Berlin-Brandenburgio, **eldonkvanto:** 200 ekzempleroj  
**Reta versio:** www.esperanto.de/bb, **reta dezajno:** Chuck Smith

**Esperanto-Informilo Berlino-Brandenburgio estas la oficiala organo  
de Esperanto-Asocio Berlin-Brandenburgio kaj de Esperanto-Ligo Berlin**

## Esperanto-Kalendaro por junio 2011

**Ĉiun ĵaŭdon** je la 20a horo **Ĵaŭda Rondo**, Berlin, Einbecker Straße 36

3-a, vendredo	14a 45	<b>Lietzensee.</b> Herbartstr. 25. Ĉeftemoj estas kantado, somero, planado por la aŭtuno.
5-a, dimanĉo	9a-16a	<b>Esperanto Renkonto en Prenzlau</b> , Schützenhaus, Grabowstraße 4.
6-a, lundo	19a	<b>EsperantoLand</b> , renkontiĝo en kafejo «Arema», Birkenstraße 30, 10551 Berlin (metrostacio Birkenstr.)
10-a, vendredo	-	<b>Lietzensee.</b> Pro Pentekosto la grupo ne kunvenas.
17-a, vendredo	10a-12a	<b>Lietzensee.</b> Kunveno en Café Blisse, Blissestr. 14.
24-a, vendredo	15a	<b>Lietzensee:</b> Pianocafé en Herbartstr./angulo Neue Kantstraße 20, 14057 Berlin.
24-a, vendredo	20a	<b>Esperanto? Plenbuŝe!</b> – praktikada tablorondo
26-a, dimanĉo	14a-17a	<b>Danziger 50.</b> «Sindetenojn mi ne ŝatas.» Historie-biografia aranĝo pri «Adolf Sproeck (1890-1978) – Metiista majstro, distrikta parlamentano kaj Esperanto-poeto el Prenzlauer Berg ».
27-a, lundo	19a 30	<b>Danziger 50.</b> Peter Kühnel: Impresoj de vojaĝo al Sudafrika Respubliko

La **Grupo Lietzensee** paŭzas dum julio kaj aŭgusto

### Antaŭrigardo al julio 2011

1-a, vendredo 18a 30 **Einbecker Str. 36: Estrarkunsido.**

### Antaŭrigardo al aŭgusto 2011

13-a, dimanĉo	14	<b>Einbecker Str. 36: Jubilea festo de la Esperanto-domo.</b>
27-a, dimanĉo	14	<b>Somera Festo en Jüterbog.</b>